

Naskiĝo de la svisa federacio, dezirata realeco
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1991.02.07 & 10

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Nia temo estas la formiĝo de la svisa federismo kaj la espero pri estontaj eŭropa kaj monda federacioj.

La pakto de 1291, kies 700-an jarekziston festas Svislando ĉijare, starigis nenian aŭtoritaton superkantonan kaj nenian komunan politikon, krom la malprecizan promeson pri reciproka kunhelpo defenda. Ĝis la fino de la dekoka jarcento la Svisa Ligo posedis kiel komunan institucion nur Dieton, kiu ne havis kunsid-lokon kaj nenion povis decidi okaze de interkantonaj konfliktoj pro la malfido, kiu regadis inter la kunsidantaj delegacioj.

A.- La Svisa Ligo formis certe tuton malpli potencon, ol la sumo de la individuaj ŝtataj potencoj, kiujn ĝi grupigis. Tio precize karakterizas mankon de reala federigo.

Cl.- Kiam la francaj armeoj ekinvadis Svislandon post la franca revolucio, la Svisa Ligo ne kapablis kontraŭmeti propran armeon. Ĉiu kanto, unu post la alia, estis submetita kaj rabita. Du el ili estis proklamitaj francaj departementoj kaj la ceteraj estis perforte unuigitaj.

A.- Estas en tiu epoko, ke Heinrich PESTALOZZI famiĝis kreante hejmon por centoj da georfoj, viktimoj de la bruligo de la urbo Stans.

Cl.- Ni rigardu al la antaŭfederacia Svislando, kiu pereis sub la battoj de la francaj armeoj.

A.- La Svisan Ligon formis dektri suverenaj ŝtatoj pli aŭ malpli potencaj. La urbo Zug estis etega, dum la Berna potenco estis vera interna danĝero. Ĝia ekstera politiko influis la vivon de la tuta Ligo, iom kiel nun Usono influas la vivon de Unuiĝinta Naciaro kaj de ties fakaj organoj. La etaj ŝtatoj havis la kutimon koalicii por rebati la regemon de la grandaj. Estis eterne ŝanĝiĝanta ekvilibro, iomete kiel en la nuna mondo, kie, malgraŭ la decidoj de la Konsilantaro pri Sekureco, fakte regas super la aliaj la plej atakemaj potencoj.

Cl.- Inter la urbaj kaj kamparaj kantoj regis malfido. Sed tiu divido inter du viv-kutimoj aristokrataj kaj demokrataj ne estis la sola disput-kaŭzo.

A.- Dum kantoj restis fidelaj al la katolika fido, aliaj protestantiĝis. Kaj ambaŭ religiaj mondoj proksimume samfortaj sin rigardis kun netoleremo. La kanto Appenzell eĉ disiĝis en du duonkantojn: unu por la katolikoj, unu por la protestantoj. Ankoraŭ nun ekzistas tiuj du duonkantoj. Dum tri jarcentoj okazis religiaj interkantonaj militoj. La konflikto Sonderbund disvolviĝinta en 1847 estis parte religia milito. La federigo de 1848, kiu konkiudis tiun civilan konflikton, ĉesigis do la lastan religian militon. Poste la federacia sistemo malebligis tiujn religiajn koaliciojn.

Cl.- Tiuj dektri ŝtatoj estis tre fieraj kaj tiklaj pri siaj absolutaj sendependeco kaj suvereneco. Tamen ili ne hezitis fari al la aliaj, kion ili ne estus volontaj travivi. Ili sin ĵetis sur la najbarajn teritoriojn por ilin submeti. Tiĉino, Aargau, Thurgau kaj Vaud sciis, kion signifis longdaŭra koloniado. Por ili la franca invado estis liberiga. Ili povis fine ekzisti, kiel ŝtatoj suverenaj.

A.- Ĉirkaŭ la Svisa Ligo ekzistis ŝtatoj, kiuj deziris eniri la Ligon. Ili kandidatiĝis. Sed neniam en la dektrikantona Dieto la ambasadoroj de la ligaj ŝtatoj povis akordiĝi por akcepti novajn kandidatojn. La eniremoj fariĝis nur amikoj de la Svisa Ligo.

Cl.- Por pliigi sian politikan premadon la svisaj ŝtatoj ne hezitis peti la helpon de eksteraj potencoj, kiel Britio, Francio, Aŭstrio aŭ eĉ Ruslando. La kantonoj, kiuj sentis sin minacitaj, petis siavice la protekton de la malamikoj de ia koncerna ekstera potenco.

A.- Sed kiam la ekstera potenco vokita volis interveni en la svisan politikan vivon, ĝenerale tuj ĉiuj svisaj ŝtatoj forgesis siajn kverelojn por kune kontraŭstari tiun potencon. Tiu stranga sinteno plurfoje mirigis kaj embarasis reĝojn kaj imperiestrojn, kiuj komparis Svislandon al vesponesto, sur kiun oni ne devas marŝi.

Cl.- Tiu reflekso kontraŭ la eksteraj intervenoj en la komplikaj svisan politikon naskis la emon al neŭtraleco. Tiuj eterne kverelantaj svisoj plej ofte ĉesigis siajn kverelojn dum la eŭropaj internaciaj konfliktoj. Antaŭ kaj post la tridekjara milito la svisoj ekzemple bataladis pro religiaj kaŭzoj, sed dum tiu religia tridekjara konflikto okazis en Svislando subita mirakla religia repaciĝo kaj neŭtrala sinteno profitiga al la Ligo mem.

A.- Oni preskaŭ povas aserti, ke Svislando ekzistis nur kiam ekstera danĝero minacis la sendependecon de ĝiaj kantonoj. Tiu reflekso pri neŭtraleco dum eŭropaj internaciaj konfliktoj donis koheron al la lando, kiu etendiĝas sur la teritorioj, kiuj partoprenis tiun reflekson.

Cl.- Svislando estis pli sento kaj ideo, ol realeco. Du ekzemploj provos komprenigi tion. Kiam, post longa restado en la franca reĝlando, la ĝenevano Jean-Jacques ROUSSEAU revenis en Svislandon, li agis strange. Enirante la bernan teritorion li haltigis sian veturilon kaj elirinte li kisis la teron kaj ekkriis: "Ĉielo, protektanto de la virto, mi laŭdas vin, mi tuŝas teron de libereco!"

A.- La samtempulo kaj malamiko de ROUSSEAU, la franco VOLTAIRE, loĝis apud la ĝeneva limo en la vilaĝo Ferney. Li emis subskribi: La sviso Voltaire, kvankam li nek vivis en Svislando, nek estis sviso.

Cl.- En tiu epoko Svislando ne estis tero multe pli liberema, ol la ceteraj eŭropaj landoj. Sed ekzistis mito pri Svislando, mito, kiun simbolas la legendo de Wilhelm Tell.

A.- Iom post iom la svisoj identiĝis kun tiu mito kaj faris de sia lando regnon de liberecoj. Sed dum la dekoka jarcento la sviseco ne ankoraŭ konkretiĝis en vivanta realaĵo. Ĝi vivis nur en la menso de idealistoj. Ĝi esprimis deziran realecon.

Cl.- Svislando en la dekoka jarcento estas komparebla al Eŭropo antaŭ la kreo de la Eŭropa Merkato kaj al la nuna mondo okcidenta favora al la homaj rajtoj. Ĝi ludis la rolon de ento. Oni povis pridubi ĝiajn ekzaktajn limojn kaj ĝian politikan koheron, sed ĝian spiritan radiadon oni ne povis prisilenti. La fremduloj ne trompiĝis. Ili rimarkis ĝian ekziston, kvankam ĝiaj popoloj preferis reliefigi siajn diferencojn.

A.- Sed subite la svisoj ne plu povis kontentiĝi je nura sviseco. Tiam ili fondis sian federacion. Pro tio multaj svisoj decidis, ke Svislando naskiĝis nur en 1848, kiam tiu metamorfozo okazis kaj ne en 1291, kiam subskribiĝis defenda pakto inter Uri, Schwytz kaj Unterwalden.

Cl.- Multaj svisoj pensas, ke simila metamorfozo okazos por Eŭropo kaj eĉ por la mondo. Kiam la eŭropanoj estos sufiĉe malkovrintaj sian komunan eŭropanecon, tiam ili havos nur unu deziron, ĝin esprimi en faktoj, konstruante Eŭropan Federacion, kiu inkluzivos ĉiujn popolojn, kiuj havas la volon esti eŭropaj. Jam nun la eŭropa idealo estas forto influanta vastan teritorion. En la nunaj konfliktoj, kiuj tragike dividas la sovetan mondon, la baltoj rigardas al Eŭropo, kiel al viv-idealo kaj al mondo, al kiu ili volas aparteni.

A.- Tiuj komparoj helpu kompreni la spiritostaton, kiu kondukis al la kreo de la svisa federacio nomata Konfederacio Helveta.

Cl.- La venontan semajnon ni raportos pri la rekta influo de la franca generalo Bonaparte dum la franca invado.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andree GACOND pretas sendi la tekston de sia prelegaro pri la formiĝo de la svisa federacio al la geaŭdantoj, kiuj petos ĝin skribi. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*